

**NSiR - Nova Sento in Rete
N. 1073 (43/2020)**

Aperiodico della Federazione Esperantista Italiana

Federazione Esperantista Italiana: posta fei@esperanto.it ; internet
<http://www.esperanto.it>

Itala Esperantista Junularo: posta iej@esperanto.it ; internet
<http://iej.esperanto.it>

Via Villoresi, 38 IT-20143 Milano Tel 02 58100857

Mandate i vostri contributi a: Norberto Saletti, notiziario@esperanto.it
indicando nell'oggetto "Per Nova Sento in Rete"

NON RISPONDETE AL MESSAGGIO CON CUI ARRIVA NSiR

I messaggi che arrivano al sistema non vengono gestiti.

Le lettere non firmate non saranno pubblicate.

Tutto il materiale distribuito da NSiR è riproducibile citandone la fonte.

ISCRIVETEVI ALLA FEDERAZIONE ESPERANTISTA ITALIANA

<http://www.esperanto.it/iscrizione-fei.htm>

LIBRERIA

<http://www.esperanto.it/libri.htm>

feilibri@esperanto.it

INCONTRI ESPERANTISTI IN ITALIA

Il Congresso Nazionale: <http://kongreso.esperanto.it>

Il Festival Giovanile di Pasqua: <http://iej.esperanto.it/ijf>

IL 5 PER MILLE ALLA FEI

Indicate il codice fiscale **80095770014** nella vostra dichiarazione dei redditi,
realizzeremo grandi progetti!



Indice articoli

- UEA Kongresos en Torino!..... 3
- Konkurso omaĝe al Gianfranco Molle 3
- Concorso letterario di traduzione 4
- IEJ assembleas rete..... 4
- Eh, tio ne okazus, se oni uzus esperanton..... 4
- Pillole di Salvezza 1073: Marcello Mastroianni 5

UEA KONGRESOS EN TORINO, NORD-OKCIDENTA ITALIO, EN 2023

Por la 108-a Universala Kongreso (UK), post tri jaroj, la Estraro de UEA unuanime elektis Italion kiel kongreslandon. La kvaran fojon UK okazos en Italio. La gastiga urbo, Torino, estis la unua ĉefurbo de Italio (1861-1865). Urbo en kiu kunfandiĝas la itala kaj la franca etoso, kie aktivis gravaj intelektuloj kiel Norberto Bobbio, Italo Calvino, Clelia Conterno Guglielminetti, Natalia Ginzburg, Primo Levi, Cesare Pavese kaj Elio Vittorini, kaj en kies universitato longtempe profesiis Giorgio Canuto, iama prezidanto de UEA. Post la dua mondmilito Torino estis celo de multnombraj suditalaj enmigrintoj, allogitaj de la grandaj fabrikoj, kio donis al la urbo ŝancon malfermiĝi, akcepti kaj helpi al bezonantaj eksteruloj. Tiurilate, aparte grava estis la aŭtomobila fabriko FIAT, kie deĵoris Ursula kaj Giuseppe Grattapaglia, dank' al kiuj la fabriko eldonis kelkajn broŝurojn kaj mallongajn filmetojn en Esperanto, por diskonigi la urbon kaj la novajn aŭtojn. Itala Esperanto-Federacio invitis kongresi en Torino ankaŭ pro la tre vigla Esperanto-grupo, kie kunvivas gravaj doĵenoj de la movado, kiaj Giancarlo Fighiera, Fabrizio Pennacchietti, Pedro Aguilar-Solà, kaj la nova generacio: mezaĝaj kaj junaj aktivuloj kun alta lingvo-kono. Subtenis la inviton ankaŭ du membroj de la Honora Patrona Komitato de UEA, la italoj Giuliano Turone, juĝisto, kaj Giorgio Novello, baldaŭa ambasadoro de Italio en Nederlando. La 108-a UK estas planata de la 29-a de julio ĝis la 5-a de aŭgusto. La kongresejo estos la ĉefsidejo de Politekniko, la urba universitato por estontaj inĝenieroj, kiu ebligos favoran kotizon. Parolante pri kotizo, ne maltrafu la unuan, plej favoran aliĝperiodon de la 106-a UK 2021 en Belfasto, ĉe <https://uea.org/kongresoj>.

Noto de la Redaktoro: pliaj detaloj sekvos, inkluzive de temo, kontaktoj, ktp

KONKURSO OMAĜE AL GIANFRANCO MOLLE

Itala Esperanto-Federacio, por omaĝi Gianfranco Molle, la plej faman italan kantiston, tutmonde konatan, animon de "Muzika Kulturo", decidis organizi konkurson pri kanzonoj originale verkitaj en Esperanto. La komisiono povos

asigni ĝis tri premiojn. La rezultoj estos anoncitaj enkadre de la itala kongreso de Esperanto, dum specifa programero.

Ĉiu persono rajtas konkursi per maksimume tri verkoj, kiuj devas esti neniam antaŭe eldonitaj per ajna komunikilo (prese, rete, lege, bloge, ktp). Maksimuma daŭro de kanzono estas 5 minutoj. La gajnintoj de la unua premio ne rajtas partopreni en la konkurso dum la sekvaj tri jaroj.

La konkursaĵojn oni sendu al la sekretario, Ivan Orsini, per retmesaĝo, al la adreso concorso@esperanto.it indikante la elektitan pseŭdonimon kaj la efektivan nomon kaj adreson; ili estu kantitaj kaj luditaj en aŭda formato mp3 aŭ ogg, kaj skribitaj (nur vortoj, eventuale kun akordoj) en teksta formato doc aŭ odt.

Premioj: la gajninto de la unua premio, premio *Ĝanfranko*, ricevos monpremion de 250,00 eŭroj, por la aliaj la premio konsistos el esperantlingvaj KD-oj.

Limdato por la sendado estas la 30-a de majo de la koncerna jaro.

Juĝkomisiono: prezidanto: Michela Lipari, sekretario Ivan Orsini, juĝantoj: Giulio Cappa, Marcella Fasani, Bertilo Wennergren

La sekretario informos ĝis la 1-a de aŭgusto la gajnintojn pri la premio.

La partoprenantoj cedas senpage al IEF por la unua jaro la rajton je unua publikigo.

Por **pliaj informoj** : concorso@esperanto.it

FEI, concorso, via Villoresi 38, 20143 Milano, Italia

CONCORSO LETTERARIO DI TRADUZIONE

Itala Esperanto-Federacio organizas literaturan tradukkonkurson de la itala al Esperanto. La konkurso konsistas el du branĉoj,

poezio: maksimuma longo ne fiksita;

prozo: (rakonto, novelo) maksimuma longo 13.000 tajperoj.

La komisiono povos asigni ĝis tri premiojn por ĉiu branĉo.

Ĉiu persono rajtas konkursi por ĉiu branĉo per maksimume tri verkoj, kies tradukoj devas esti neniam antaŭe eldonitaj per ajna komunikilo (prese, rete, lege, bloge, ktp). Ne eblas partopreni per traduko de propraj verkoj, ankaŭ se la itala originalo estas eldonita. La gajnintoj de la unua premio ne rajtas partopreni en la konkurso en la sama branĉo dum la sekvaj tri jaroj.

La konkursaĵojn, kune kun la originaloj, oni sendu al la sekretario, Ivan Orsini, prefere per retmesaĝo, al la adreso concorso@esperanto.it indikante la branĉon, la elektitan pseŭdonimon kaj la efektivan nomon kaj adreson. Se tio ne eblas, oni sendu ilin papere al la adreso Federazione Esperantista Italiana, via Villoresi 38, 20143 Milano, Italia, indikante sur la koverto "literatura konkurso" kaj enmetante la kontribuaĵo(j)n kaj la originala(j)n tradukita(j)n verko(j)n sen ajna indiko kaj notante en aparta folio ĉiujn necesajn indikojn kiel supre.

Premioj: la gajnintoj de la unua premio de la du branĉoj ricevos akvaforton originale verkitan por la premio Zamenhof, por la aliaj la premio konsistos el esperantlingvaj libroj. La unua premio en la branĉo "poezio" havas titolon "Gaudenzio Pisoni"; la unua premio en la branĉo prozo havas titolon "Lina Gabrielli". La disdono de la premioj okazos dum la koncerna kongresa programero; se premiito ne ĉeestos ĝin, tiu estos kontaktata pri la livero.

Limdato por la sendado estas la 30-a de aprilo de la koncerna jaro.

Juĝkomisiono: prezidanto: Michela Lipari, sekretario: Ivan Orsini; por branĉo poezio: Giulio Cappa, Tiberio Madonna, Nicolino Rossi; por branĉo prozo: Gabriele Aquilina, Valerio Dalla, Norberto Saletti.

La sekretario informos ĝis la 1-a de aŭgusto la gajnintojn pri la premio.

La partoprenantoj cedas senpage al IEF por la unua jaro la rajton je unua publikigo.

Por **pliaj informoj** : concorso@esperanto.it

FEI, concorso, via Villoresi 38, 20143 Milano, Italia

IEJ ASEMBLEAS RETE

La Jarasembleo de Itala Esperantista Junularo, dum kiu estas elektota la nova estraro okazos la 23an de decembro, pere de la platformo *Google Meet*. Ni anoncos la konsiston de la nova estraro en venonta numero.

EH, TIO NE OKAZUS, SE ONI UZUS ESPERANTON



Se, come me, siete amanti dei Pink Floyd (e se non lo siete, cosa ci fate su questa rivista?), riconoscerete al volo il brano. Ma questo aspetto mi era sfuggito!

PILLOLE DI SALVEZZA 1073: MARCELLO MASTROIANNI

Il 19 dicembre è l'anniversario della morte (nel 1996) dell'attore italiano Marcello Mastroianni (1924-1996). it.wikipedia.org/wiki/Marcello_Mastroianni.

Rinviamo alle pagine di Wikipedia, e trascriviamo (con traduzione in italiano) parte di un articolo mandato in onda il 21 dicembre 1996 dalla Radiotelevisione Italiana-RAI (Radio Roma), nel quadro delle trasmissioni per l'estero in

Esperanto. Alleghiamo un francobollo del 1988 della Repubblica di San Marino, per Marcello Mastroianni, Federico Fellini e Anita Ekberg.

RAI INTERNATIONAL, Radio Roma-Esperanto, 21.12.1996

La mondo de kino funebras pro la morto de Marcello Mastroianni, kiu okazis pasintan ĵaŭdon en Parizo. Serioze malsana de longa tempo, Mastroianni, kiu havis 72 jarojn, estis la plej konata kaj aprezata aktoro itala en la mondo; en li multaj identigis, spite al li, la modelon de "latina viro". Dum tre longa kariero, Mastroianni estis direktita de la plej grandaj italaj reĝisoroj, kaj li estis la ideala rolulo por Fellini, de la tempoj de "La dolĉa vivo" kaj poste "Ok kaj duono", ĝis la plej ĵusaj "La urbo de la virinoj" kaj "Ginger kaj Fred". Sed ne estis nur itala la kariero de la granda aktoro. Fakte, kiam la itala kinoarto komencis ne plu proponi taŭgajn rolojn al la aktoro, Mastroianni iris labori eksterlanden, kie li estis aprezata ĝis la lastaj jaroj.

Kaj el eksterlando, fakte, ne mankis mesaĝoj de partopreno en la doloro pro la malapero de la granda itala aktoro. "Li estis serioza, kvankam li ne prenis sin serioze", memorigis kun amemo la franca reĝisoro Roger Vadim, kiu aldonis: "Lia humuro, lia mildeco estas la plej altvaloraj kaj maloftaj kvalitoj de geniuloj". Kortuŝita Anika Ekberg: "Marcello estis spontana aktoro, li ne bezonis vesti sin per la rolo konfidita al li, ĉar li estis ĉiam li mem", diris la neforgesita interpretino de "La dolĉa vivo".

En Romo, honore al Marcello Mastroianni, eĉ haltis en sia fluado la akvo de Fontano de Trevi, funebre ornamita per nigra drapiraĵo. Ĝuste Mastroianni, kune kun Anita Ekberg, ĝin transformis siatempe en la simbolon de la dolĉa vivo, unu el la ĉefverkoj de Fellini.

Il mondo del cinema è in lutto per la morte di Marcello Mastroianni, avvenuta giovedì scorso a Parigi.

Gravemente malato da lungo tempo, Mastroianni, che aveva 72 anni, era il più conosciuto e apprezzato attore italiano nel mondo; in lui molti identificavano, suo malgrado, il modello di "latin lover".

Nel corso di una lunghissima carriera, Mastroianni è stato diretto dai più grandi registi italiani, ed era il personaggio ideale per Fellini, dai tempi de "La dolce vita" e poi "Otto e mezzo", fino ai più recenti "La città delle donne" e "Ginger e Fred". Ma la carriera del grande attore non è stata solo italiana. Infatti, quando il cinema italiano incominciò a non proporre parti adeguate all'attore, Mastroianni andò a lavorare all'estero, dove fu apprezzato fino agli ultimi anni.

E dall'estero, infatti, non sono mancati messaggi di partecipazione al dolore per la scomparsa del grande attore italiano. "Era serio, anche se non si prendeva sul serio", ha ricordato con affetto il regista francese Roger Vadim, che ha aggiunto: "Il suo humour, la sua mitezza sono le più preziose e rare qualità dei geni".

Commosa Anika Ekberg: "Marcello era un attore spontaneo, non aveva bisogno di rivestirsi del ruolo che gli era affidato", ha detto la non dimenticata interprete de "La dolce vita".

A Roma, in onore di Marcello Mastroianni, si è perfino fermato il fluire dell'acqua della Fontana di Trevi, parata a lutto con un drappo nero. Proprio Mastroianni, con Anita Ekberg, la trasformò a suo tempo in un simbolo della dolce vita, uno dei capolavori di Fellini.

